

Heinrich Heine, Lorelej <i>tradukita de Ludwig Lazarus Zamenhof</i>	Heinrich Heine, Lorelej' <i>tradukita de Leopold Elb</i>	Heinrich Heine, The Lorelei <i>tradukita de Mark Twain</i>	Heinrich Heine, Lorelay <i>tradukita de Hans- Georg Kaiser</i>
	<i>Tiu traduko estas poste iom modifita de aliu- loj, ne estas la origina traduk-versio de Leo- pold Elb.</i>	<i>An ancient legend of the Rhine</i>	
Ne scias mi, kial sub- ita malgaj' en la koro na- skiĝis; el tempo jam enteri- gita legendo al mi revi- viĝis.	Ne scias mi, kial mi estas Malgaja en la kor'. Antikva fabelo restas Por ĉiam en mia me- mor'.	I cannot divine what it meaneth, This haunting nameless pain: A tale of the bygone ages Keeps brooding through my brain:	Min kaptas malgaj' en la koro, pro kio tia trist'? Fabel' el antikva foro ne lasas de mi kun persist'.
Jam malvarmetiĝas l' aero, la Rejno mallaŭte ba- bilas, per oro de l'sun' en vespero la supro de l' monto rebrilas.	Vespero jam ekmal- heliĝas, Fluadas la Rejn' en trankvil', La supro de l' monto lumiĝas En vespersuna bril'.	The faint air cools in the gloaming, And peaceful flows the Rhine, The thirsty summits are drinking The sunset's flooding wi- ne;	Aere fridetas, trank- vilas, malhelas jam la Re- jn'. La monto surpinte brilas vespere en rava scen'.
Plej belan knabinon mi vidas: en ora ornamo bri- lante, sur supro de l' monto ŝi sidas, la harojn mistere kombante.	Belega knabino jen tronas Kun ora juvelar', La belan vizaĝon kronas Mirinde la ora ha- rar'.	The loveliest maiden is sitting High-throned in yon blue air, Her golden jewels are shi- ning, She combs her golden hair;	Tre ĉarma feino sidas, jen supre por ador'; la ora ornamo ridas; ŝi kombas harojn el or'.
La oran kombilon ŝi movas kaj kantas tra l' pura aero, kaj forto mirinda sin trovas en tiu ĉi kant' de l'vespero.	Ŝi uzas kombilon el oro Kaj dume kantas ŝi. Mirige tuŝas al koro Sorĉiĝa la melodi'.	She combs with comb that is golden, And sings a weird refrain That steeps in a deadly enchantment The listener's ravished brain:	Ŝi kombas per ora kombilo kaj kantas kun pasi'; mirigas min la elbrilo kaj forto de l' melodi'.
...	...	...	...

Ŝipet' iras sur la rivero, ŝipisto ekstrems de l' kanto, kaj blinda por ĉiu danĝero rigardas li al la kantanto.	Kaj sopiregon eksentas Ŝipisto dum sia vetur'; Rifaron li ne priententas, Al monto rigardas li nur.	The doomed in his drifting shallop, Is tranced with the sad sweet tone, He sees not the yawing breakers, He sees but the maid alone:	Ŝipisto ŝipeton gvidas, lin kaptas ve' de ekzalt'. Li ja la rifojn ne vidas', li vidas nur supren sen halt'.
--	--	---	---

Ha, baldaŭ ŝipisto la bela perdiĝis sub l' akvoturnado; ĝin Lorelej' faris kruela, per sia mirinda kantado.	Mi kredas, ke dronos finfine Ŝipisto kun sia boat', Kaj tion kaŭzis feine La Loreleja kantad'.	The pitiless billwos engulf him!- So perish sailor and bark; And this, with her baleful singing, Is the Lorelei's gruesome work.	Mi kredas, ke ondoj tiras la ŝipon funden de l' Rejn'; kaj tio de l' kant' eliras de Lorelaj-siren'.
--	--	---	---

*Traduko de la Germana poemo "Die Lorelei" de HEINRICH HEINE (\*1797-12-13 - †1856-02-17) en Esperanton de LUDWIG LAZARUS ZAMENHOF (Ludoviko Lazaro Zamenhofo, \*1859-12-15 - †1917-04-14).*

*Arg-2-565 (2009-10-30 16:15:09)*

*Tiun ĉi tradukversion mi prenis el retejo <http://www.esperanto.mv.ru/Kolekto/Lorelej.html>.*

*Traduko de la Germana poemo "Die Lorelei" de HEINRICH HEINE (\*1797-12-13 - †1856-02-17) en Esperanton de LEOPOLD ELB (†1912-08.04).*

*Arg-2-71 (2005-02-03 19:06:30)*

*La traduko troviĝas sur paĝo 84 de la lernolibro „Post la kurso“ de Wilhelm kaj Hans Wingen, eldonita de Ludwig Pickel en Nurembergo (Nürnberg), Germanio.*

*Traduko de la Germana poemo "Die Lorelei" de HEINRICH HEINE (\*1797-12-13 - †1856-02-17) en la Anglan de Mark Twain.*

*Arg-2-11 (2003-10-13 04:42:59)*

*A Tramp Abroad. Vol 1-2. Leipzig: Tauchnitz, 1880 Band I, Mark Twain 1880 (rf. <http://www.loreley.com/loreley/marctwai.htm>)*

*Traduko de la Germana poemo "Die Lorelei" de HEINRICH HEINE (\*1797-12-13 - †1856-02-17) en Esperanton de HANS-GEORG KAISER (Cezar, \*1954-05-21).*

*Arg-2-564 (2005-02-03 19:18:09)*